N. N. 92,

# Alfluginta birdeo

*tradukita de Ferdinand Pfeil*

Alfluginta birdeto
sin sidigis ĉe mi;
amatinan saluton
en la bek' portis ĝi.

Ne en hejm', knabineto,
en fremdland' estas mi;
ne min amas kateto
nek hundet' tie ĉi.

Ŝi promesis feliĉon
por la tempo de l' flor';
la somero jam venis -
l'amatin' estis for.

Kara birdo, reflugu
kun salut' kaj kiset'!
Ke mi povu nun flugi -
vana amdeziret'.

*Traduko de la Germana poemo "Kommt ein Vogel geflogen" de N. N. 92 en Esperanton de Ferdinand Pfeil.*

*Arg-1033-2096 (2014-05-31 10:33:23)*

*Tiun ĉi kanto-tradukon mi, Manfred Retzlaff, trovis en la libro "Internacia Kantaro", eldonita en 1922 de la eldonejo Ferdinand Hirt u. Sohn en Lepsiko (Leipzig), Germanio. La kantojn kolektis kaj eldonis Paul Bennemann.*

N. N. 92,

# Kommt ein Vogel geflogen

Kommt ein Vogel geflogen,
setzt sich nieder auf mein´ Fuß,
hat ein Zettel im Schnabel,
von der Mutter ein´ Gruß.

Ach, so fern ist die Heimat,
und so fremd bin ich hier;
und es fragt hier kein Bruder,
keine Schwester nach mir.

Hab mich allweil vertröstet
auf die Sommerzeit;
und der Sommer ist kommen,
und ich bin noch so weit.

Lieber Vogel, flieg' weiter,
nimm ein' Gruß mit und ein' Kuss,
denn ich kann dich nicht begleiten,
weil ich hier bleiben muß.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas N. N. 92.*

*Arg-1033-2095 (2014-05-31 10:37:28)*

*Pri la kanto vidu la retejojn* `http://de.wikipedia.org/wiki/Kommt_ein_Vogel_geflogen`*, respektive* `http://www.labbe.de/liederbaum/index.asp?themaid=30&titelid=570`*. La verkinto de tiu popola germana kanto laŭdire estis Adolf Bäuerle. Sed tio ne estas certa. La melodion probable verkis Wenzel Müller. Pri tiuj vidu la retejojn* `http://de.wikipedia.org/wiki/Adolf_BΓhuerle` *kaj* `http://de.wikipedia.org/wiki/Wenzel_MΓëller`*.*